# N I A V O Ĉ O

Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde ekde la 18.30h en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras Lupe Sanz NOVEMBRO 1998


*Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo: http://www.ciudadfutura.com/esperanto*

**HISPANIO**

ESTO (Esperantista Societo de **Tenerife) d**enove instruos esperanton en La Laguna Universitato. La kurso, gvidota de Alejandro López Vergara, proferoso de angla lingvo en la Universitato, komenciĝos en 1999 laŭ titolo "Introducción al esperanto y su cultura" . La kurso estos oficiala kaj havos 3 kreditojn.

Tomás Ortíz kun la helpo de la Urbodomo de **San Javier (Murcio)** daŭrigas la kursojn kaj diversaj aktivaĵojn. Antaŭ nelonge aperis esperanta versio de la broŝuro pri la "Museo de la Jesukaverno" de San Javier.

**JUNA E-TENORO**

Rukadeno Dávila, 15 jaraĝa esperantisto de Tenerife, surdiskigis la operon Marina kune kun Alfredo Kraus, María Bayo, Juan Pons, Baquerizo, la koruso de Konservatorio de Santa Cruz kaj la Simfonia Orkestro de Tenerife. Rudakeno kantis kun la koruso kaj ricevis gratulojn de Kraus, Bayo kaj la direktoro de la orkestro. Rudakeno kiam estis 7 jara kantis "La donna e móbile" en la Kongreso de Sant Cugat. Nun li ankaŭ ludas violonon kaj apartenas al la Koruso kaj Orkestro de la Konservatorio de Tenerife.

**LITERATURAJ PREMIOJ**

**Jorge Camacho** atingis jenaj premiojn en la belartaj konkursoj de UEA: Poezio, tria premio pro Anastasio, honora mencio *proKavernaj pensoj.* Prozo, dua premio *Atesto*

La libro El miaj sonoraj soloj de **Miguel Fernández Martín** gajnis la premion "La verko de la jaro 1997", ĉi foje rezervitan por poezio. La premio estis asignita per referendumo fare dela abonantaro de "Literatura Foiro"

**ILEI**

Augusto Casquero, petas helpon por la reorganizado de la instruado de Esperanto en lernejoj. Li informas ankaŭ ke ĉe la 58-a Hispana E-Kongreso de Castellón ILEI preparos ekzamenoj. Vi povas koni vian nivelon de esperanto kaj atingi oficialan atestilon.

## KRISTNASKA LOTERIO

La plej fama loterio de esperantujo jam estas vendata. La numero estas mirinda kaj pro tio aĉetinda.

## 14. 462

Blokoj po 50 biletoj . La prezo de la bileto, 200 pesetoj inkluzivas donacon de 40 pesetoj.

Dum novembro, por disdoni loterion ni estos en Rodríguez San Pedro 13-3º lunde (nefesta) kaj jaŭde ekde la 18.00 horo

**ESPERANTO EN "INTERNET"**

Novaĵoj ĉe TTT-ejo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo: www.ciudadfutura.com/esperanto

- modernigo kaj de formo kaj de enhavo

- novaj numeroj de Gazeto Andaluzio kaj Nia Voĉo
- retserĉilo (speciale de hispanaj paĝoj)nome “Metaserch”
- diskutforumo (agora)



**HEF ANGULO**
**Lunde** kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: *admin@esperanto-es.org*

Koresponda kurso: HEF. Libro, vortaro, kasedo kaj persona helpo unu fojon semajne. 15.000 pesetojn

La pasintan 17a de oktobro akazis la unua prepar-kunveno por partopreni en **Expolingua**, la lingva foiro kiu okazos en Madrido inter la 22a kaj la 25-a de aprilo. HEF jam rezervis la luadon de stando.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**
Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

**Kursoj**:

Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas).

Baza kurso, merkrede 18.30 ĝis 19.300. Profesoro Antonio Tur
Supera kurso, merkrede 19,30 ĝis 20,30. Instruas Juan del Castillo

Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18. Por triaaĝuloj lunde matene.

**Prelego**: 5 de novembro. (jaŭdo) 19.00 h.“Vojaĝo al Granada-Alpujarras”. Lumbildoj

**EKSTERLANDE**
Ekde majo la hungara trajno kiu trafikas inter Bukareŝto kaj Sibiu nomiĝas “Esperanto”. En temas pri internacia trajno sed pri grava enlanda trajno de la Rumanaj Fervojj.
En la telefonlibro de Budapest, inter la fremdlingvaj ĝeneralaj informoj aperas ankaŭ la tutkolumna esperantlingva teksto.

## !!!! KRISNASKA LOTERIO Nº 14.462 ¡¡¡¡¡

**La redakcio de “Nia Vocxo” ricevis jenan noton kiun ni publikigas. “Heroldo” estas parto de la Madrida esperanta historio cxar geedzoj Fighiera redaktis kaj eldonis gxin en Madrido dum kelkaj jaroj.**

## "Heroldo" reiros al sia legitima posedanto

1. Nia neprofitcela societo "Heroldo de Esperanto", ricevis la samnoman gazeton de la fondinto Teo Jung en 1960 kaj dawrigis gxian eldonadon gxis 1996 sub la 36-jara redaktado de Ada Fighiera-Sikorska.

2. En 1996 nia asocio transdonis la gazeton al la Itala Interlingvistika Centro (Milano) sub la nepra kondiCXo -trifoje ripetita en la protokolo de la 17-a de julio 1996, subskribita ankaw de Ada en drama viv-cirkonstanco, -pri "respekto de la tradicio kaj principoj" de la gazeto. La tradicio kaj principoj estis, i.a. el: la gazeto havas CXefe informan karakteron pri la disvastigo de Esperanto; gxi estas sendependa kaj supertendenca pri movadaj ideologioj kaj internaj konfliktoj.

3. Kiel CXiuj povas konstati, la supraj kondiCXoj neniam estis respektataj de la nova redakcio. Jam fine de 1966 en la "rawmisma" gazeto "Literatura Foiro" (LF) oni povis legi, ke post la akiro de "Heroldo" la rawmistoj (malgranda tendenca grupo, preskaw nur ewropa, kiu opozicias al la gxenerala Esperanto-Movado, negative jugxas la Universalajn Kongresojn kaj proponas alternativan Esperanto-komunumon) posedas du gazetojn: la diritan LF kaj Heroldon mem. Konforme al la supre citita deklaro, la novaj redakcianoj, kunawtoroj de la rezolucio de Rawmo (Finnlando) en 1980, senrajte transformis la gazeton en personan organon de ra'misma ideologia propagando kaj de siaj privataj kvereloj; en CXiu numero la redakciaj geedzoj dawre kaj grandspace aperigadas tendencajn artikolojn sub propra nomo, sub aliaj kromnomoj aw prunteprenitaj aw elpensitaj subskriboj (Valerio Ari, Giorgio Silfer, Nicolas Vanof kaj aliaj estas la sama persono; ankaw pluraj surpaperaj E-societoj estas ligitaj al tiu persono). La lukto de la nuna redakcio kontraw nia Movado, kontraw personaj kontrawuloj kaj kontraw aliaj Esperanto-gazetoj eskaladis gxis senprecedence granda nombro da artikoloj kun ripetitaj en CXiu numero klaCXoj, pikoj, subfosoj, rezolucioj,manifestoj, polemikoj, atakoj, provokoj kaj personaj skandaloj; sen paroli pri la utiligo de la gazeto fare de la redaktorino por propagandi sian propran kandidatigxon Cxe Akademiaj elektoj.

Cxio tio semas malharmonion inter la esperantistoj kaj montras, ke "Heroldo" estas nun redaktata ekzakte law la malaj principoj ol tiuj, kiuj inspiris Teo Jung kaj Ada, ambaw amataj, pacemaj, lojalaj agantoj en nia Movado dum entute pli ol 70 jaroj. Evidente, la rawmistoj rajtas diskonigi siajn teoriojn, sed ne rajtas eluzi tiucele Heroldon.

4. Dum la pasintaj du jaroj nia societo vane provis per dekoj da privataj kaj publikaj atentigoj konvinki la novan redakcion de la gazeto respekti lafundamentan kondiCXon ligitan al la transdono de la gazeto, t.e. la respekto de gxiaj tradicio kaj principoj.

5. Cxar la supre citita kondiCXo de la transdono estis kaj estas malrespektata de la novaj eldonantoj, la transdono mem farigxis senvalora kaj awtomate nuligxis. Tial, nia Societo decidis repreni CXiujn siajn antawajn rajtojn ek de 31-a de decembro 1999, dato je kiu -law sciigo en la kolofono de la nuna "Heroldo"- finigxos la dejxoro de la nuna redaktorino.

Ek de nun, la eldon-kaj vendorajtoj de la nacilingvaj lernolibroj eldonitaj de nia societo iras senpage al landaj asocioj de la koncernaj lingvoj.

6. Fine, per la nuna komuniko la subkribinto nuligas sian alvokon (lasta numero de "Heroldo" de 1996), en kiu li petis abonantojn de "Heroldo" resti fidelaj al la nova redakcio. La esperantistoj laboru por la disvastigo de Esperanto, for de ideologioj, kiuj senhalte semas malkonkordon per la mono de la abonantoj de "Heroldo".

7. Nia societo sendos al CXiu petanto kopion de la supre menciita protokolo de 1996 pri la transdono de "Heroldo" kaj la koncernan postan korespondadon.

Torino, la 1-an de oktobro 1998

G. C. Fighiera,
prezidanto de la legxe registrita societo sen profita celo

"Heroldo de Esperanto".

<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<
>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>>

**KORESPONDA KURSO**

HEF organizas, je nacia nivelo, koresponda kurso (poŝte kaj pere de internet, laŭ la libro "El esperanto: curso de la lengua internacional". La materialo inkludas librojn, ekzercojn vortaron kaj kasedon. Prezo: 15.000 ESP. Pago: remburse aŭ pere de bank-konto Caja Postal nº 14.011.966, je la nomo de Federación Española de Esperanto

**PLIA E-STRATO**

Kultura Asocio Esperantisto inauguros en novembro straton, en la urbo Sentmenat (Barcelono), kun la nomo "Esperanto"

**ESPERANTO EN "INTERNET"**

Kuba Esperanto-Asocio: kubesp@ip.etecsa.cu * * * kubesp@mail.infocom.ete.sa.cu
Norvega Espeantista Ligo: esperanto@online.no (turisma servo: afitjar@onlilne.no)
Esperanto en radio //members.aol.com/OSIEK/AERA
Pasporta Servo: //home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm
Kataluna Esperanto Asocio: //stel.net/esperanto.kea * * * kea@stel.net
Multlingva Inform-Centro: www.esperanto.net
Mesaĵ-tabulo en la reto: www.dejanews.com pere de ĝi oni atingas forumon "alt.esperanto.principiante" kaj aliajn

**UEA ĈE ISO**

Ekde 1990 UEA havas oficialan kunlaboran statuson, en kategorio A, kun la Teknika Komitato TC-37 "Terminologio: principoj kaj kunordigo" de Internacia Organizo por Normigado (ISO). En tiu kategorio estas nur 18 internaciaj organizoj, i.a. Unesko, Monda Organizo por la Sano kaj Eŭropa Komisiono. En la kunveno de aŭgusto partoprenis, kiel observanto de UEA Roland Lindblom. En la kunsido oni prezentis i.a. la programon "Multlinga terminaro kaj kondiĉon por la pluvivo de malgrandaj lingvoj"

**WILIAM AULD KANDIDATO POR NOBEL-PREMIO**

La plej elstara el niaj vivantaj poetoj estis proponita por la literatura Nobel-premio. La kandidatigon deponos Esperanta PEN-Centro, Esperantlingva Verkista Asocio kaj aliaj, laú projekto iniciata de Manuel de Seabra. Kvankam la ŝancoj estas praktike nulaj, sed la propono havas gravan moralan signifon kaj krome ĝi montras laûdindan kunlaboron de diversaj literaturistaj medioj en Esperanto.